

KLASADO DE LINGVOJ LAŬ STRUKTURO KAJ LA LOKO DE ESPERANTO INTER ILI

de Prof. W. E. COLLINSON.

Prelego en Internacia Somera Universitato, Oslo, 1952.

Ni povas klasi — aŭ, se vi preferas, klasifi aŭ enklasigi — la lingvojn laŭ almenaŭ du principoj: unue, per esploro de la historio de lingvoj tra la tempo, t.e. la *diakronisma* metodo, kiel dirus Ferdinand de Saussure kaj, due, per priskribo de la interna strukturo de iuj ajn lingvoj en difinita periodo de tempo, t.e. la *sinkronisma* metodo de la sama svisa lingvoscienculo. Laŭ la unua ni kvazaŭ renversas la historian evoluadon kaj serĉas en pasintaj epokoj la originon aŭ praformon de tuta serio da interparencaj lingvoj, ekz. ni kungrupigas la francan, hispanan, italan ktp. kiel latinidajn lingvojn, la latinan siavice ni komparas historie kun la sanskrita, greka, keltaj kaj teŭtonaj lingvoj ktp. ĝis ni atingas la hind-eŭropan pralingvon. Tiu lingvo komencis — eble antaŭ kvar jarmiloj — eligi siajn branĉojn en plurajn direktojn, branĉojn, kiuj en novaj medioj pli kaj pli diferencigis unu de la aliaj kaj de la pralingvo. Aliaj grandaj familioj de historie parencaj lingvoj estas 1. la ugrofinna kun la finna, estona, lapona, hungara kaj pluraj lingvoj de centra kaj orienta Rusujo kaj de okcidenta Siberio, kaj 2. la semida familio kun la formortintaj babilona kaj aramea kaj la ankoraŭ aŭ denove aktivaj hebrea, araba kaj amhara (etiopa). Laŭ nia nuna scio ekzistas sur la tero granda nombro da lingvofamilioj ĝis nun ne redukteblaj aŭ kungrupigeblaj kun aliaj, sed kompreneble tio ne rajtigas nin aserti, ke la homaj lingvoj ĝenerale originis en diversaj lokoj sendepende — mankas al ni la donitaĵoj por decidi tiun problemon.

Hodiaŭ ni provos esplori la diversajn lingvostrukturojn formulitajn post zorga analizo kaj kompara priskribo de multaj lingvoj. Ĉi tiu esplorado rezultigos kelkajn iom paradoksajn konstatojn, ekz. ke la angla lingvo de hodiaŭ — kvankam laŭ deveno, radikaro kaj finaĵoj klare hind-eŭropa — tamen en multaj trajtoj ŝajnas laŭstrukture pli kaj pli alproksimiĝi al la tipo de la polineziaj lingvoj kiel *Maori* de Nov-Zelando. Aliaflanke kelkaj observoj emas montri, ke la ĉina lingvo ne ĉiam estis tiel unusilaba kiel hodiaŭ, sed havis kelkajn finaĵojn.

De la lingvoscienculoj, kiuj provis dividi la lingvojn laŭ strukturtipoj, ni povas citi la verkon „Language” de E. Sapir, kiu bone sciis, krom la pli proksimaj lingvoj, plurajn nord-amerikajn kaj okcident-afrikajn dialektojn; ankaŭ la verkon „Language” de L. Bloomfield, kiu sekvis Sapir en la katedro de lingvoscienco en la Universitato Yale, kaj „Grundprobleme der Sprachwissenschaft” (Fundamentaj problemoj de la lingvoscienco) de la germano Hermann Guntert.

Por struktur-analizo aplikata al eŭropa lingvo estas citinda la verko „Structurele Syntaxis” de A. de Groot (Amsterdam 1950) pri la nederlanda.

En la lastaj jaroj ankaŭ la usonanoj dediĉis multe da tempo al la priskribo de lingvaj strukturoj. Tre rekomendinda estas la ampleksa verko de Eugene A. Nida: „Morphology — The Descriptive Analysis of Words” (Ann Arbor, 1951), kiu analizas specimenojn de multaj lingvoj inkluzive de kompleksaj indiĝenaj lingvoj de nord- kaj sud-Ameriko, de la pacifikaj insuloj kaj de la proksima oriento kaj Afriko. Nu, la morfologio pristudas *morfemojn*, t.e. la minimumaj signifelementoj, ĉu plenvortoj, ĉu afiksoj, aŭ fleksioj. Oni eliras de tio, kion la parolantoj fakte diras, kaj Nida montras, kiel ni povas analizi eĉ lingvojn ĝis nun ne skribitajn kaj neniel traktitajn de gramatikuloj. En la parolo ni provas konstati tiujn elementojn, kiuj havas la saman formon ligitan al la sama signifo aŭ funkcio. Trairante en Esperanto tutan serion da vortoj ekz. sablero, neĝero, fulgero ktp. ni eltrovas la sufikson *-er*, kaj samtempe konstatas ke ĝi ne troviĝas en la vortoj kariero aŭ junipero. Kelkfoje ni renkontas en multaj lingvoj (tamen ne en Esperanto) la tielnomitajn nulformojn, ekz. en la angla, kiu uzas „sheep” kaj por „ŝafo” kaj por „ŝafoj”. La nulformoj estas eltroveblaj nur per tio ke ili troviĝas en la samaj kuntekstoj kiel la plenformoj, ekz. en la angla kiu distingas inter „la ŝafo estas manĝanta” „the sheep is eating” kaj „la ŝafoj estas manĝantaj” per „the sheep are eating”. Krome ni observas en kelkaj lingvoj la procedon de depreno aŭ subtrahado ekz. en la samoaj dialektoj la infinitivo estas kvazaŭ ŝtumpo de la plenradiko (*tanisia* „ploris”, *tani* „plori”).

Por kompreni strukturajn problemojn ni bezonas kelkajn fakterminojn. De la hindaj gramatikuloj ni heredis la esprimon *radiko* por la ne plu analizebla elemento de signifo en la vorto. La radiko estas efektive la signifokerno. Vorton kiel *servistino* ni analizas en kvar elementojn, el kiuj *serv-* estas la signifokerno, kiun modifas aŭ determinas sinsekve la afiksoj *-ist-*, *-in* kaj *-o*. Se ni ĉesigas la analizon ĉe *servist-*, ni ricevas formon ankoraŭ analizeblan kiel en la angla *servant* aŭ la germana *Diener* aŭ la norvega *tjener*. Tiam formon la angloj nomas *stem*, la germanoj *Stamm* (laŭvorte „trunko”) kaj la norvegoj *stamme*. La norvego Trygve Knudsen nomas *stamme* tiun parton de vorto, kiu estas la fundamento en fleksiaj formoj kaj derivaĵoj. Se ni ne uzas en etendita senco la vorton „temo” (kp. la francan uzon de „thème”) mankas al ni en Esperanto preciza termino, do mi proponas uzi *stamo*. Tio ebligas al mi alpreni la metodon proponitan de Guntert kaj distingi kvar el liaj strukturaj klasoj, t.e. 1. la radik-izola klaso, 2. la stam-izola klaso, 3. la radik-fleksia klaso, 4. la stam-fleksia klaso. La vorto „fleksio” mem estas iom dubesenca. La plej vasta signifo estas tiu de iu ajn modifo de la radiko aŭ stamo, ĉu per aldono de silaboj, ĉu per internaj ŝanĝoj. Sapir volas uzi la vorton „fleksio” en la specifa senco de kunfandiĝo, ekz. en la latina formo *boni homines* la finaĵo *-i* kunfandas en unu formo la indikon

de kazo (nominativo), de genro (vira) kaj de nombro (pluralo). Tamen Güntert uzas la vorton en la pli vasta senco.

Ni povas nun mencii la diversajn procedojn, kiuj estas disponeblaj al lingvouzantoj por klare konigi la rilaton de lingvaj formoj inter si. Ili estas jenaj:

1. La simpla *apudmeto* de la signifaj elementoj en difinita ordo, ekz. por kaf-muelilo la anglo diras „coffee mill”, sed la kimro „melyn coffi”. En sintakso, „la hundo mordis la katon” estas en la angla „the dog bit the cat”; sed por „la hundon mordis la kato” la anglo devas renversi la ordon kaj diri „the cat bit the dog”. Do vortordo estas fakte tre grava, sed ne egale grava en ĉiuj lingvoj.

2. La *kunmeto* de liberaj formoj por estiĝi novan unuon (kunmetajon), ekz. *vaporŝipo*, *steamship* ktp. En la angla la kombino *a black bird* kun du fortakcentoj estas en Esperanto *nigra birdo*, sed *a blackbird* kun unu fortakcento estas nova unuo kaj estas en Esperanto la simpla vorto *merlo*. Troviĝas diversaj gradoj de interligo inter la elementoj de kunmetajoj.

3. La *duobligo* (angle „reduplication”) t.e. la ripeto aŭ de tuta vorto aŭ de unu aŭ pluraj silaboj de la vorto. En la angla ni malofte uzas tiun procedon en vortfarado escepte por montri malŝaton, ekz. *goody goody* „piaĉa” aŭ *pretty pretty* „pseŭdobela”. En la keĉua, kiu daŭrigas la lingvon de la inkaoj en sud-Ameriko, la duobligo de vorto povas indiki kolekton, ekz. *orko-orko* „montaro”, *ako-ako* „sabla dezerto”, sed krome — iomete kiel la jam cititaj anglaj vortoj por neŝatinda eco — ekz. *tullu-tullu* signifas ne nur „ostoj” kaj „ostejo”, sed ankaŭ „tiel maldika ke la ostoj estas videblaj”. En la lingvo *Maori* de Nov-Zelando la duobligo uziĝas kelkfoje por la pluralo, ekz. *he rakau nui* „arbo granda”, *he rakau nunui* „arboj grandaj”, ankaŭ por objektoj kiuj konsistas el du aŭ pli da partoj, ekz. *pukapuka* por „pulmoj” aŭ por agoj ripetataj, ekz. *maremare* por „tusi” kaj eĉ kelkfoje por la diminutiva formo, ekz. *wera* „varma”, *wera wera* „varmeta”. La hind-eŭropaj lingvoj kutime formis la perfektan de la verbo per silab-duobligo, ekz. lat. *tundo* „mi frapas”, „*tutudi* „mi frapis”, sed tiu procedo jam tute ĉesis en la eŭropaj lingvoj, kiuj nuntempe uzas la duobligon por insisti, ekz. en Esperanto *plena plena* aŭ eĉ *iomete*.

4. La *interna vokaldiferencigo* aŭ modifo: en la angla nur en restaĵoj el tre malproksima epoko, ekz. *mouse* „muso”, *mice* „musoj”, *I write* „mi skribas”, *I wrote* „mi skribis” (tiaj verbformoj troviĝas en multaj hind-eŭropaj lingvoj, ankaŭ en vortfarado, ekz. lat. *tego* „mi kovras aŭ tegas”, *toga* „mantelo aŭ togo”). La procedo troviĝas en multaj lingvoj kelkfoje kune kun duobligo, ekz. *zigzagi* (kp. *zigzag*, *Zickzack*, kimre *igam ogam* ktp.), *thes*: „ĉi tiuj” / *those* „tiuj” ktp.

5. La *afiksado* — la afikso povas esti antaŭmetata kiel prefikso, postmetata kiel sufikso, kaj enmetata kiel infikso. Afikso ne estas libera formo, ĝi ekzistas nur ligite kun radikoj aŭ bazo, ekz. prefiksoj: angle *anti-war* „kon-

traŭmilita”, *pro-war* „pormilita”, *pre-war* „antaŭmilita”, *post-war* „postmilita”; sufiksoj *goodness* „boneco”, *ridiculousness* „ridindeco” ktp. En la nuntempaj eŭropaj lingvoj ne ekzistas infiksoj; sed ili troviĝas en kelkaj lingvoj de orienta Azio. En la lingvo de la *Munda* tipo en Hindujo, ekz. en la *Sora* de Madraso la radikoj *lung* signifas „malsekigi” sed *lenung* estas „malsekeco”; krome en la *Tagalog* de la Filipinoj *sulat* signifas „skribo”, sed *simulat* „skribinto”. Oni povas kompari en la latina la apudeston de *iugum* Esp. *jugo* kaj *jungo* kp. Esp. *jungi*.

En la morfologio (gramatiko) prefikso uziĝas en la germana kaj nederlanda por la participo pasinta (*gekommen* „veninta”, *geliebt* „amata”), sed treege disvastigita estas sufiksado aŭ por formi kazojn kaj nombrojn de la substantivo, adjektivo kaj pronomo aŭ por provizi sin per verboformoj.

6. La *ritmaj* aŭ *prozodiaj procedoj*, ĉu per diferencoj en la loko de la fortakcento, ĉu per diversaj tonoj aŭ tonmovoj, ĉu per intermeto aŭ nuligo de paŭzoj. En la angla la fortakcento okaze montras la diferencon inter substantivo aŭ adjektivo kaj verbo, ekz. *accent* „akcento”, *accént* „akcenti”, *perfect* „perfekta”, *perféct* „perfektigi”. Tondiferencoj estas karakterizaj en Eŭropo por la norvega kaj sveda, litova kaj latva, serbokroata kaj kelkaj aliaj lingvoj, sed ili ne estas tiel fundamente gravaj kiel en la ĉina kaj en kelkaj okcident-afrikaj lingvoj. En la ĉina la radikoj *mai* kun suprentonado signifas „aĉeti”, kaj kun malsuprentonado „vendi”. Se oni kunmetas ambaŭ tondiferencajn radikojn ekz. *mai-mai*, oni ricevas la vorton por „komerco”.

Nun ni povas komenci nian klasadon per la ĉina, ĉar kiel ekzemplo de lingvo radikizola ĝi estas la plej tipa. Mankas al ĝi ĉiu ajn diferencigo de vortklasoj (substantivoj, verboj ktp.). En ĝi troviĝas nek internaj ŝanĝoj nek afiksoj je la sola escepto de partiklo *ti*, kies funkcio estas la determinado kiel en Esperanto la finaĵo *-a*. La vortoj konsistas aŭ el radikoj apudmetitaj aŭ el unuopaj radikoj, el kiuj ĉiu havas karakterizan tonon por distingi la signifojn de vortoj alie homonimaj (samformaj), ekz. la radikoj *ma* kun kvar malsimilaj tonoj signifas en la mandarina parola lingvo 1. patrino, 2. kanabo, 3. ĉevalo kaj 4. granda. La ĉina ofte kombinas radikojn senmodife por formi specon de kunmetajoj, ekz. por „gepatroj” la simplan apudmeton patro-patrino, sed la interligo ne estas tiel forta kiel en la eŭropaj lingvoj. La ordo, en kiu la vortoj prezentiĝas, estas tamen treege grava. La subjekto staras antaŭ la predikato, ekz. „li ven” por „li venas, venos aŭ estas veninta”; la atributo aŭ determinanto staras antaŭ la determinato, ekz. „grand vir”, kaj la rilatvortoj kiaj niaj prepozicioj ankaŭ staras antaŭ la objekto. La vortordo restas sama en demando, kiu tamen indikiĝas per la uzo de vorteto kia la Esperanta *ĉu*, sed ĝi troviĝas ĉe la fino de la frazo.

Multaj pacifikaj lingvoj, ekz. la polineziaj en Samoo, Havajo kaj Nov-Zelando montras la fenomenon de *stamizoleco*. Tiam tipon oni povas koncepti, se oni pensas pri speco de Esperanto kun vortfaraj sufiksoj kiel *kontentig* aŭ

konstruij, sed sen gramatikaj finaĵoj. Tiel, en *Maori*, oni povas el la radikoj *kai* „manĝi” formi la vorton *kainga* „manĝado” kaj de *moe* „dormi” la vorton *moenga* „lito”. Kelkfoje la *Maori* uzas prefikson, ekz. *whaka-* kiel Esperanto uzas en la sama signifo la sufikson *ig*. Ni diras ekz. *esperantigi*, sed la *Maori* lingvo havas *whakamaoritanga*. Krome okazas malofte modifo de la interna vokalo. La pluralo de *tangata* „viro” estas kun longa vokalo *tangata* „viroj”.

Güntert nomas *radikfleksio* la procedon, laŭ kiu oni modifas la radikojn interne. La ĉeftipo de tiaj lingvoj estas la semida lingvofamilio. En la araba, ekzemple, la radikoj estas citata kiel trikonsonanta skeleto aŭ kadro. Por la ĝenerala signifo „skribi” la araba provizas la tri konsonantojn k-t-b kiel radikoj, kiu kun diversaj vokal-enmetaĵoj povas esprimi „li skribis” (*kātab*), „la skribanto” (*katib*), „la skribaĵo” aŭ „libro” (*kitab*). La semidaj lingvoj havas efektive ankaŭ kelkajn sufiksojn, ekz. la posedan sufikson de la unua persono *-i* en *kitabi* „mia libro” kaj la hebreaj pluraloj en *im*, ekz. *Serafim* kaj *Cherubim*. La araba krome uzas prefiksojn, ekz. en *mektabi* „skribtablo”. La vokal-alternojn ni trovas ankaŭ en la antikvaj hindeŭropaj lingvoj ne nur en la verbaj formoj sed ankaŭ en la vortfarado, ekz. lat. *tego* „mi tegas”, *tegula* „teĝolo”, *toga* „togo”; aŭ *fido* „mi fidas”, *fides* „fido” kaj *foedus* „kontrakto” — tamen tiu procedo ne plu estas fundamenta kiel en la semida lingvaro.

En la deknaŭa jarcento oni distingis tutan serion da lingvoj inkluzive de la finna, hungara kaj turka, kiujn oni nomis aglutinaj lingvoj. En tiuj lingvoj oni havas kiel bazon vortradikon aŭ vortstamon, al kiu oni sinsekve aldonas aŭ algluas neliberajn sufiksojn por indiki ne nur la gramatikajn rilatojn, sed ankaŭ la posedon, la transitivon, la neadon, la devigon ktp. En la turka la radikoj *sev* „ami” povas ricevi ĉenon da sufiksoj klare distingeblaj, ekz. por la ideo-komplekso „ne amigi” ĝi havas *sev-der-me-mek* en kiu *der* estas kiel la sufikso „ig”, *me* estas nea sufikso kaj *mek* markas la infinitivon. En la finna oni formas vortojn kun kaza kaj poseda sufiksoj kunigitaj, ekz. *kirko-ssa-ni* „en mia preĝejo”, *koulu-ssa-ni* „en mia lernejo”, *talo-ssa-ni* „en mia domo”, en kiuj la unua sufikso markas la latinan inessivus (la „en-kazo”) kaj la dua sufikso la posedon. La finna ne uzas prefiksojn escepte de *epä*, kiu indikas mankon aŭ senecon.

La plej imponaj ekzemploj de prefiksemaj lingvoj estas tiuj de la Bantu-popoloj en meza kaj suda Afriko, etendiĝantaj de la *Suaheli* ĝis la *Zulu*. Ili distingas vortkategoriojn per klasprefiksoj, ekz. la klason de vivantaj estaĵoj kaj senvivaj objektoj. La ununombra formo por „infano” *mtoto* havas la pluralon *watoto* — krome troviĝas apartaj klasoj de diminutivoj, de objektoj en paroj kiel okuloj, lokoj, agoj. Verdire, en Esperanto ni havas klasprefiksojn, ekz. *bo-* por edzrilateco, *ge-* por kuneco de ambaŭ seksoj kaj *eks-* por ĉesinta funkciado, sed se Esperanto procedus kiel la Bantu-lingvoj, ĝi dirus ne „bonaj viroj” sed *aj-bon oj-vir* kiel en la *Subia* lingvo oni diras por „la homo estas malbona”: *mu-ntu uzo mu-bi* kaj por „la homoj estas malbonaj” *ba-ntu*

abo ba-bi. Tamen, la Bantu-lingvoj uzas ankaŭ sufiksojn en la vortfarado, ekz. *ku-omba* „almozpeti”, sed *mwombajili* „almozpetisto”.

Se ni sekvas la hind-eŭropajn lingvojn ĝis en malproksiman pasintan epokon, ni konstataj multe pli grandan sintezecon ol hodiaŭ, ekz. la latina formo *amaretur* estas tradukata kutime per helpverboj kiel en Esperanto „(ke) li estu amata”, sed ili almenaŭ ne enkorpigas en la verbon la esprimon de la objekto regata. Kelkaj ugro-finnaj lingvoj faras tion. La plej alta grado de enkorpigo aŭ sintezeco en Eŭropo troviĝas en la baskaj aŭ eŭskaraj dialektoj; ankaŭ en kaŭkaziaj lingvoj kiel la kartvela de Georgio kaj en multaj nordkaj mez-amerikaj lingvoj inkluzive de tiu de la Eskimoj. En la baska oni povas kunfandi en unu formon subjekton, verbon kaj pronom-objekton, ekz. *dakusat* „mi ĝin rigardas” (por kiu oni povas diri pli analize *ikusten dut*, sed ankaŭ tie la vorto *dut* kunfandas la subjekton kaj objekton). La grenlanda dialekto de la Eskimoj iras pluen. El la bazo *taku* signifanta „vido” aŭ „ĉeesto” oni formas ne nur *takuvara* por „mi estas vidinta lin”, sed ankaŭ *takungilari* „mi ne estas vidinta lin” kaj eĉ *takunarpog* „li estas videbla” aŭ *takunguvoq* „li estas laca vidi ĝin”. Fakte vidiĝas simila emo en la franca ekz. en *je m'en suis allé* „mi estas foririnta” aŭ *je ne m'y fie pas* „mi ne fidas al ĝi” (ĉar la formoj *me*, *en* kaj *y* estas ĉiam „ligitaj formoj” aŭ „konjunktivoj”). Ankaŭ la paroldialektoj de la kimra lingvo montras altgradan kunfandiĝon, ekz. en nord-Kimrujo *ddaru nw ddechra* por „ĉu ili komencis”, frazo aŭ preskaŭ frazvorto, en kiu la ŝanĝo de la konsonanto *d* en frikativon montras la demandon, en kiu *nw* estas la ligita formo de la pronomo ili post prepozicio ĉi tie forlasita kaj la *dd* de *ddechra* montras la apartenon de la vorto al specifa sintaksa grupo. Nu, tiaj francaj kaj kimraj frazoj estas analizeblaj kaj tio ŝajnas al mi iom senvalidigi la teorion prezentitan de Jespersen en „Progress in Language”, nome ke la evoluado de lingvoj ekiras de tre komplikita stato kaj ke la origine neanalizeblaj frazeroj iom post iom elkristaliĝas por formi difinitajn kaj libere moveblajn vortojn. Imponis al mi tiurilate la majstraj analizoj, kiujn faris la fama norvega lingvoscienculo, profesoro Alf Sommerfelt en siaj esploroj de la *Arunta* lingvo de sud-Australio en „La Langue et la Société” (Oslo 1938).

En ĉi tiu traktado de diversaj strukturtipoj espereble mi sufiĉe klare montris, ke neniu lingvo apartenas pure kaj ekskluzive al iu ajn tipo. Certe ni konstatis, ke la ĉina unuflanke kaj la eskima aliaflanke markas la ekstremajn limojn, inter kiuj la lingvoj organiziĝas. De tempo al tempo mi citis formojn en Esperanto por starigi komparojn, kaj nun mi povos iom konsideri la pozicion, kiun Esperanto mem okupas el la vidpunkto struktura. Oni ofte asertis, ke Esperanto estas aglutina lingvo kaj pravigas tiun opinion per la konstato, ke ne nur la afiksoj, sed ankaŭ la finaĵoj estas facile difineblaj kaj ke la afiksoj povas funkcii preskaŭ kiel radikoj. Oni pensas pri ĉenado de elementoj ekzemple en *kun-FAND-ig-em-a* aŭ *for-BRUL-ig-il-o*. Tamen, ni rimar-

kas, ke Esperanto neniam atingas la staton de la finna aŭ turka lingvoj, ĉar ĝi uzas prepoziciojn anstataŭ kazosufiksoj kaj ĝi havas apartajn adjektivojn de posedo. Aliaflanke la fakto mem ke la sufiksoj en Esperanto ofte funkcias kvazaŭ radike, apartigas ĝin de la finna aŭ turka, en kiuj la sufiksoj estas ĉiam „ligitaj formoj”. En unu rilato Esperanto montras la fleksian karakteron de la hindeŭropaj lingvoj. En la skribo ni povas facile distingi ekz. la vortklasajn sufiksojn -o kaj -a de la pluralsufikso -j kaj la akuzativsufikso -n, sed en la parolo ni fakte faras el -oj kaj -aj unuecajn diftongojn. Do, se ni volas, ni povas difini Esperanton kiel meze fleksian, malforte aglutinan lingvon.

Esperanto havas do entute la karakterizajn trajtojn de la hindeŭropaj kulturlingvoj. Ni jam rimarkis la grandajn diferencojn, kiujn montras aliaj lingvotipoj. La esprimbezonoj kaj esprimkapabloj de la popoloj estas mirinde diversaj. Kelkaj nord-Amerikaj lingvoj, ekz. *minomini* studata de Bloomfield, havas specialajn formojn de la verbo por indiki la surprizon kaj ankaŭ la seniluziigon, emocioj, kiujn ni kutime esprimas per la voĉtonoj. La kartvela de Georgio distingas inter verboj de ago kiel „mi skribas” kaj verboj de sperto, ekz. por „mi aŭdas” oni devas diri proksimume „al mi sonas”. Kiel Bloomfield montras, en la jam menciita *Tagalog* la rakonta frazo, ekz. mi tranĉas lignon, havas kvar diversajn formulojn. Se oni atentigas al la subjekto aŭ aganto, oni diras laŭvorte: „mi estas tranĉinto de ligno”; aliaflanke, se oni volas esprimi la pasivan formon de Esperanto „la ligno estas tranĉita de mi”, oni diras „la tranĉitaĵo de li estas la ligno”. Krome oni havas specialajn frazotipojn por akcenti la lokon aŭ la parton de la ligno, el kiu oni tranĉas kaj por la instrumento, per kiu oni tranĉas. En Esperanto ni ne modifas la konjugacion de la verbo laŭ tiuj konkretaj ideoj.

Resume, mi estas tentata kompari la diversajn tipojn de lingvaj strukturoj al la diversaj manieroj, laŭ kiuj oni povas konstrui muron aŭ domon. La nuntempa ĉina lingvo aspektas kiel tiuj ciklopaj muroj, en kiuj grandaj blokoj el nefasonita ŝtono staras unu apud la alia en difinita ordo sen mortero kaj preskaŭ sen elstarajoj. En la polineziaj lingvoj oni jam vidas kelkajn ligilojn inter la ŝtonblokoj. Tiuj ligiloj multobliĝas en la malforte sintezaj hindeŭropaj lingvoj kaj ankaŭ en la afiksemaj finna kaj turka kaj en la vokalalternoj de la semidaj lingvoj. La enkorpiĝaj aŭ „polisintezaj” lingvoj kiel la baska aŭ la eskima ne tiom similas al ŝtonkonstruaĵoj kiom al domoj kunmetitaj el interplektitaj branĉoj, kiuj siavice eĉ estas kovritaj per argilo tiel ke oni devas forte klopodi por disigi kaj priskribi la erojn, el kiuj ili estas konstruitaj.

Mi nun venas al la fino. Restas nur diri, ke mi ĉiam trovis Esperanton taŭga komparilo kaj analizilo por reliefigi la apartajn trajtojn de aliaj lingvoj. Eble la uzo, kiun mi faris de Esperanto en ĉi tiu prelego, nur konfirmos vian propran admiron al la valora instrumento por lingvaj studoj, kiun D-ro Zamenhof metis en niajn manojn.

LA PROBLEMO DE LA LOGANTARO EN JAPANUJO

de Prof. D-ro HIDEO YAGI, Okayama Universitato.
Prelego en Internacia Somera Universitato, Haarlem 1954.

1. Antaŭparolo.

Japanujo estas lando, kiu havas monde faman naskopovon. Post la dua mondmilito ĝi perdis 45 % da landospaco kaj fariĝis malgranda lando en formo de piza ŝelo.....ne, ĝi estas jam pizo mem en la Ekstrema Oriento.

Sed la multiĝo de loĝantoj daŭras senĉese, ĉar homoj revenas el la kontinentoj amase al sia hejmlando, soldatoj revenis ankaŭ kaj la monde fama naskiĝforto daŭras senŝanĝe. Kion fari en la estonteco? Tio estas la demando ne nur por ni Japanoj, sed ankaŭ por la tuta mondo.

Estas vero, ke la problemo estas malfacila, granda homa afero, kiu rilatas al plej diversaj flankoj,nome, politika, socia, ekonomia, popolhigiena, medicina, k.a.

Mi ne estas en la pozicio diskuti la demandon de la politika flanko, nek de la ekonomia kaj alispecaj flankoj. Ĉar mi estas kuracisto, mi povas priparoli la aferon nur de la medicina vidpunkto. Pro tio, mi volas paroli 1. pri la vivostatistiko de la japana popolo, 2. pri la naskolimigo de diversaj metodoj, inter kiuj sin trovas japanaj elpensoj kaj 3. pri la antaŭvido de ĝia estonta stato.

2. Tro multe da homoj.

En la 2a de Januaro 1954 nia Regnestro en Tokio akceptis Novjaran saluton de urbanoj de Tokio en sia palaco. La palaco ordinare estas fermita al la publiko kaj tial la popolo volis uzi tiun bonan ŝancon por ekvidi ĝin, enirante la lokon, kiu estas respektata kaj al kiu sopiras la tuta popolo japana. Por saluti la Geregnestrojn kaj por rigardi la internon de la palaco, homoj komencis eniri de la 9a matene kaj entute 381 250 vizitis en longa vico da svarmantaj grupoj ĝis la 2a 15 posttagmeze, kiam subite okazis granda tumulto. Unu virino maljuna falis ŝanceliĝante kaj je tiu momento la sekvantaj homamasoj ankaŭ ŝanceliĝis, renversiĝis, falis unuj sur aliajn kaj amaso da homoj kunpuŝiĝis en unu momento. Ekestis senorda haoso nesavebla, en kiu 16 mortis kaj 63 vundiĝis. Vi eble ne povos eĉ imagi tian strangan scenon. Estas certe, ke tiu ĉi rakonto montras, kiom multe da homoj vivas en Japanujo. La kaŭzo estas ke la nombro de loĝantoj estas tro granda.

Nun mi volas rakonti al vi la duan ekzemplon. Ĉu vi konas la faman verkon „Malgrandaj Virinoj” de Louisa May Alcott (1832-1888)? Ĝi estas rakonto de 4 fratinoj en la aĝo de 20, 19, 17 kaj 13 jaroj. Antaŭ nelonge, naturkolora kinfilmo de MGM-Kompanio Usona estis importata en Japan-